Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 9an de septembro 2010 per Skype.

(Aprobita la 4an de novembro 2010.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne
Geir Arne Paulsen en Tromsø
Asbjørn Lindh en Oslo
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 12an de aŭgusto 2010

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

Kaj Skagen Vekst kaj Skagen Høyrente kreskis dum la lasta monato.

3. Jarkalkulo 2009

La jarkalkulo estas aprobita de la estraro.

4. Jarraporto 2009

La estraro finfaris la raporton.

5. Broŝuro

La estraro decidis fari novan stokon de la violkoloran broŝuron «Esperanto – det internasjonale språket – språket uten grenser». Ni ricevis grafikon/tekston por la sama broŝuro de la Dana Esperanto-Asocio, kio simpligos la laboron.

6. Biblioteko

Douglas Draper, Espen Stranger Johannesen kaj Sverre Opsahl finpakis niajn librojn en la biblioteko de Hamar. 30 skatolojn oni transportos al Oslo, 45 sendiĝos al la Nacia Biblioteko en Mo i Rana. La estraro elkore dankas pro ilia laboro.

7. Eventualaĵoj

Geir Arne Paulsen informis pri la Landa Kunveno 2011, kaj la estraro decidis ke la kunvenejo estos Sydspissen Hotell. Ulf Lunde sendos informon por Norvega Esperantisto pri loko, datoj kaj aliaj detaloj.

La interkonsiliĝo daüris inter 19.40 – 22.20.

La venonta interkonsilĝo okazos la 7a de oktobro je 19.30 (prokrastita ĝis la 4a de novembro).

Raportis Ingebjørg Rambjør.